Votre revue de l'Association Pour l'Espéranto

N° 3 - 2016

# Espéranto en Marche

ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO
APE
ASOCIO POR ESPERANTO

## *Enhavo*

**Paĝo 2 : ĜENERALA ASEMBLEO de APE (MONTZEN 15/10/2016)**
**Paĝo 3 : Oktaga tendumado de la Verdaj Skoltoj.**
**Paĝo 4 : « «**
**Paĝo 5 : « «**
**Paĝo 6 : « «**
**Paĝo 7 : La Biblioteko de APE.**
**Paĝo 8 : Malnova metio : Ringado de lignaj radoj.**
**Paĝo 9 : « » « »**
**Paĝo 10 : Informoj pri Esperanto en Belgio kaj Internacie**
**Paĝo 11 : Informoj pri Esperanto en Valonio.**
**Paĝo 12 : Kotizoj 2016 por APE kaj UEA. Abono al Eo-Info.**

************************************************

**Editeur responsable: Claude Glady**
**Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE**
**071/64 49 16 cglady@arcadis.be**

# ĜENERALA ASEMBLEO DE APE
# Sabaton 15/10/2016 en MONTZEN

**La prochaine Assemblée Générale annuelle aura lieu le Samedi 15 octobre 2016 de 13 h 30 à 17 h à l'ancienne Maison Communale de MONTZEN, Place Communale (coin opposé à l'église).**

**ORDRE DU JOUR**

**- Accueil; liste des participants (membres du comité; membres effectifs; membres des groupes); quorum requis; tenue du protocole.**
**- Approbation du P.V. de l'A.G. du 17/10/2015.**
**- Rapport financier : - présentation du budget 2015 – 2016 (cotisations, subsides, dépenses, recettes).**
**- rapport des commissaires aux comptes.**
**- Rapport des activités entre le 1er juillet 2015 et le 30 juin 2016. (groupes de Charleroi; Liège; Louvain-la-Neuve; Verviers; Kelmis; Namur; Verdaj Skoltoj; et isolés)**
**- Prochaines activités.**
**- Fonctionnement de l'A.P.E. : revue ; site internet; ... .**
**- Relations avec : UEA; EEU; SAT; KOMUNIKADO; BEF; FEL; EBG; Cheminots; villes wallonnes.**
**- Décharges aux administrateurs.**
**- Candidatures : Conseil d'Administration; Membres Effectifs; Commissaires aux Comptes.**
**- Elections.**
**- Divers : Les points divers que vous désireriez voir traités peuvent être soumis au Conseil d'Administration via la Secrétaire Bernadette PONCELET :**
**bernadetteponcelet@skynet.be tel.: 087/39 85 70**

**Je rappelle aux membres effectifs que lors de leur candidature, ils ont signé pour leur présence à l'Assemblée Générale ou à défaut être représenté par une procuration écrite à un membre du Conseil d'Administration ou un autre membre effectif.**
**Pour les groupes sus-nommés, la présence du Président, du Secrétaire et/ ou du trésorier (à défaut un membre du groupe les représentant) est requis.**
**Tout Espérantiste est accepté à l'A.G. seuls les membres du C.A. et les Membres Effectifs ont droit de vote, les autres ont une voix consultative.**

**La Secrétaire de l'A.P.E Bernadette PONCELET**

## Procuration pour les membres <u>effectifs</u>

**Je soussigné ..........................................................................................**

**membre effectif de l'Association pour l'Espéranto, donne par la présente procuration à**

**..............................................................................................................................................**

**pour me représenter lors de l'AG du 15 octobre 2016 et y exprimer à ma place tout vote qui y serait sollicité**

**Signature**

**NB : Seuls les membres effectifs ont voix délibérative. Pour être membre effectif, il faut avoir introduit une demande de candidature ECRITE, candidature qui aura été acceptée par le Conseil d'Administration d'APE, et être EN ORDRE DE COTISATION pour 2016.**
**La liste des membres effectifs est consultable chez le trésorier (071/ 644916).**

# OKTAGA TENDUMADO DE LA VERDAJ SKOLTOJ

**(21-28/08/2016)**



**Partoprenis 10 homoj el 6 malsamaj landoj/regionoj:**

**Bongo el Duisburg, Germanio; Camille el Beyrouth, Libano; Clara kaj Lucie en Bruselo; Delfeno el Antverpeno, Flandrio; Dingo el Givet, Francio; Korsako el Bruĝo, Flandrio; Lupo el Sambreville, Valonio; Olivia kaj Tanguy el Andenne, Valonio**

***Gastigis nin:*** **Bernadette kaj Paul en Plombières, Hati kaj Ben en Zutendaal, Aline kaj Carsteen en Balen, Ella kaj Eddy en Kruibeke. Dankon al ili!**

***Organizis:*** **Lupo kaj Dingo laŭ ideo de *trankvila semajnfino* de Delfeno kaj Korsako**

## UNUA TAGO : dimanĉon la 21an de aŭgusto…

**Lupo kaj Dingo frue alvenis en Plombières ĉe Bernadette kaj Paul. Ili starigis tendon kaj tegmenton kaj atendis la skoltojn.**
**Estis tiom da vento ke ili bezonis preskaŭ horon por starigi tegmenteton…**
**Por starigi la tendon, Paul kaj Bernadette venis helpi ilin (dankon!).**

**Ĉiuj alvenis laŭ la plano. Afablaj kaj zorgemaj gepatroj starigis la duan tendon. Poste la skoltoj preparis la vespermanĝon (tomatoj, laktuko, mocarelo, spicoj) kaj manĝis ĝin**
**Ne estis varma tago: ĉirkau 16 gradoj, multe da vento, iom da pluvo.**
**Ni klarigis la programon de la semajno kaj la ĝeneralan organizadon. Poste ĉiuj iris dormi frue.**

## DUA TAGO : lundon la 22an de aŭgusto

**Ni bicikle ekskursis ĝis la plej alta loko de Nederlando kaj la trilanda punkto; kiu iam estis kvarlanda kun neŭtrala Moresneto. Post ripozado, ni kuiris kaj vespermanĝis. Legom-kradrostado kun rostitaj suker-pufaĵoj kiel deserto.**
**Estis bela tago, iom pli varma.**




## TRIA TAGO : mardon la 23an de aŭgusto…

**Estis la unua etapo de nia bicikla tendumado: faldi la tendojn, paki, ŝarĝi la aŭton, ĝisi Bernadette kaj Paul, bicikli dum la tuta tago. La skoltoj forgesis la fotilon, do ni ne havas foton de la biciklado. Ili iris de Plombières al Zutendaal, trapasis la Mozon per pramo kaj atingis Kesselt kie Lupo iris serĉi ilin aŭte. Ili rakontis ke ĝi estis tre malfacila etapo kun varmego (fakte pli ol 32°C), multaj grimpadoj kaj malbonaj vojoj... Ĉu vi kredas ilin?** ***Komentoj :***
***Lupo*****: Persone, mi tre dubas ke la vojoj estis tiom krutaj... Hazarde ili forviŝis la informojn de la navigilo, do ne eblas kontroli!**
***Korsako*****: Kaj hazarde vi ne estis tie dum la biciklado, vi devis ŝofori.** ***Lupo*****: Iu devis ŝofori. Ĉu vi pli ŝatus bicikli kun via sako kaj tendo? Mi tamen konsentas ke estis tre varma tago, mi multe ŝvitis en la aŭto**
***Dingo*****: Feliĉe ne aperas la fakto ke mia pantalono hontige ŝiriĝis, tiel ke mia kalsoneto videblis. Al fizika aldoniĝis mensa fortostreĉo (kvankam plia aeruma truo dum tiu varmega tago ne tro malhelpis)**

## KVARA TAGO : merkredon la 24an de aŭgusto…

**Estis ripozo-tago post la hieraŭa longa kaj laciga biciklado. Ni profitis por instrui iom da Esperanto al la komencantoj kaj por priparoli pri "kio estas skoltoj" kaj pri la totemiĝo. Ni ankaŭ decidis la koloron de niaj estontaj skoltaj ĉemizoj! Vespere ni promenis ĉirkaŭ la apuda lago en bela naturo.**

## KVINA TAGO : ĵaŭdon la 25an de aŭgusto…

**Denove bicikla tago! 50 km de Zutendaal ĝis Balen. Hati biciklis kun ni dum tiu sunega kaj varmega tago (neniu nubo kaj pli ol 33°C). Feliĉe anstataŭ piknikon ni ricevis monon por manĝi survoje. Kompreneble ni elektis fritejon! Kiam varmas, kiam vi longe biciklas, la plej bona estas manĝi varmajn kaj grasajn fritojn, ĉu ne?**
**Ni alvenis akurate ĉe Carsten kaj Aline en Balen. Ni starigis la tendojn, vespermanĝis. Iu endormiĝis sur la sofo kiam alia stultumis en la tendo. Estis belega tago!**



## SESA TAGO : vendredon la 26an de aŭgusto…

**Finfine Delfeno (kiu elpensis tiun bicikladon) alvenas! Pro la varmeco ni ŝanĝis la planon: anstataŭ tuj bicikli 90km ĝis Kruibeke, ni iras naĝi kaj amuziĝi en belega lago kun glitejoj, blanka sablo… Poste Lupo kaj Jean-Pol ŝoforis nin ĝis Lier por malgrandigi la lastan etapon. Bedaŭrinde ni malgajnis multan tempon pro la trafiko. Do Korsako kaj Bongo ne povis bicikli kun ni.**
**Ni trairis feston en Lier, daŭrigis nokte ĝis la Skeldo kiun ni transiris dank'al senpaga pramo. Kaj ni alvenis ĝusta tempe ĉe Ella kaj Eddy por vespermanĝi. Ĝojo! Lupo, Korsako kaj Bongo jam starigis la tendojn en la ĝardeno.**

## SEPA TAGO : sabaton la 27an de aŭgusto…

**Normale devus esti ripozo-tago. Jaŭdon ni biciklis dum pli ol 50km kaj vendredon ni iris naĝi kaj biciklis pli ol 40km. Sen forgesi la pakadon kaj staradon de la tendoj! Sed estis la antaŭlasta tago… kaj la lasta nokto! Do matene ni ludis dume Korsako preparis la diskejon. Kelkaj simi-umis…**
**Posttagmeze ni biciklis ĝis Rupelmonde, la naskiĝloko de Mercator. Kaj nun la juna Mercator estas oficiale honora membro de la Verdaj Skoltoj!**
**Vespere estis diskejo! Korsako bonege majstris kaj etosigis. Ĝis kiam Lupo metis atenditan muzikon kaj ni ĉiuj kantis:**
**Festemaj skoltoj renkontiĝas kaj dancas kun la Majstro de l'diskej'**
**Tiel Korsako ricevis sian kvaliton. Nun vi povas nomi lin Korsako, la majstro de l'diskej'**

## OKA TAGO : dimanĉon la 28an de aŭgusto..

**Lasta tago!**

**Ni pakis, lavis, ordigis… kaj tute forgesis foti!**

**Lupo vekis la skoltojn sufiĉe frue. Dume ni matenmanĝis, ĉiuj rimarkigis al Delfeno ke li estas tre varma.... pli ol kutime varma… eĉ diris ke li febras…**

**Finfine ni ĉiuj knuflis (varme kaj emocie brakumi) lin ĉar li estas tiom agrable varma! Tiam Lupo klarigis la novan kvaliton de Delfeno: la vivon varmigas. Ĉar li vere konstante etosigas nian grupon kiel varma suno. Kiel por la aliaj, lia kvalito venas el Esperanto-kanto:**
**« La vivon varmigas la sun' » de Alejandro Cossavella.**

**Kaj kredu nin, kvankam Korsako ricevis sian kvaliton hieraŭ vespere, kvankam ni nekaŝe kunsidis por prepari tiun surprizon, kvankam estis la lasta tago… li tute ne atendis kaj estis por li granda bona surprizo !**
**Eble ni devintus oferti al li « la naivulo » kiel kvalito!**

**Bongo matene foriris por longa vojaĝo ĝis Germanio. Posttagmeze ĉiuj foriris unu post la aliaj.**

**Laste foriris Korsako kaj Delfeno. Korsako devis trafi trajnon ĝis Bruĝo kaj Delfeno akompanis lin ĝis la kajo. Tie ili fotis sin. La sola foto de la tago!**

**Fino de la bicikla tendumado. Ĝis baldaŭ !**

***Raportis*: Lupo**

**La tuta raporto kun fotoj estas kunsultebla ĉe la retejo de la Verdaj Skoltoj :**

**http://www.verdajskoltoj.net/ aŭ rekte ĉe https://lc.cx/o5hv**

**Ni esperas ke vi ŝatis legi niajn aventurojn.**

**Ni aktive varbas novajn membrojn, se vi konas 11-16 jarulon kiu volas travivi aventurojn, kontaktu nin! Ni sendos al li aŭ ŝi invitilon.**
**Se vi ŝatas nian projekton, bonvolu subteni nin!**
**Ni vere bezonas homforton, kaj monsubtenon por daŭrigi kaj grandigi niajn agadojn.**

**https://www.verdajskoltoj.net/subtenu-nin/**

# LA BIBLIOTEKO DE APE

**Ĝi enhavas plurajn milojn da diversaj libroj kaj kolektoj de revuoj. La listo de la titoloj devas esti kompletigita sed jam listo de pli ol mil libroj estas konsultebla en formato pdf. Vi povas obteni ĝin pere de la bibliotekisto (cglady@arcadis.be). Ĉiu ankaŭ povas veni ĉe la hejmo de la bibliotekisto en la ĉarma vilaĝo de CERFONTAINE (adreso : Rue du Culot, 1 BE-5630). Bonvolu averti telefone (071/644916) antaŭ ol veni ĉar li ne ĉiam estas hejme.**






# MALNOVA METIO (1)

## Por longtempa uzado, lignaj ĉarradoj bezonas ferringan protektadon. Tia realizado  estas la tasko de la spertaj radfaristoj.



**Jen la ligna rado, kiu ne ankoraŭ posedas sian feran ringon.**



**Unue dum unu horo, la fera ringo es-tas hejtigita en cirkla fajro de lignaj ŝtipetoj, por ke ĝi dilatiĝu.**



**Kiam ĝi sufiĉe dilatiĝis, la radfaristoj alportas ĝin singardeme.**



**Ili precize pozicias la feran ringon ĉirkaŭ  la lignan radon.**

# MANOVA METIO (2)

**Fotita dum la "Verda Foiro" en Cerfontaine (6/08/2016)**



Per fortaj martelbatoj, ili enŝovas la ringon ĉirkaŭ la rado.



Pro la hejto, la ligno ekbrulas kun densa fumado. Necesas rapide malhejtigi per pluraj siteloj da akvo.



Ankoraŭ sufiĉe hejta, la ligna rado kun fera ringo estas transportata plenzorgeme



Finfine, la radfaristoj atendas, ke la rado plene malvarmiĝas en akva banujo.

# INFORMOJ PRI ESPERANTO

## BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Prezidantino :** | S-ino Flory WITDOECKT (Oostende) | 059 702 914 | flory2@witdoeckt.be |
| **Sekretario** : | S-ro Claude GLADY (Cerfontaine) | 071 644 916 | cglady@arcadis.be |
| **Kasisto** | S-ro Eric BAERT (Braine L'Alleud) | 02 384 82 23 | baert.eric@skynet.be |

**BEF (Defakta Asocio) estas kupola federacio, agnoskita far UEA, por la tri belgiaj regionaj grupoj : APE, FEL, EBG.**

## ASOCIO POR ESPERANTO (APE)

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Honora Prezidanto :** | Marcelle DELFORGE | 071 431 413 | mardelforge@brutele.be |
| **Prezidanto :** | Georges SOSSOIS | 071 436 205 | georges.sossois@gmail.com |
| **Sekretariino :** | Bernadette PONCELET | 087 398 570 | bernadetteponcelet@skynet.be |
| **Kasisto :** | Claude GLADY | 071 644 913 | cglady@arcadis.be |
| **Eventoj :** | Valère DOUMONT | 0485 517 552 | doumontvalere@yahoo.fr |
| **Promocio Eo :** | Hubert DEMEYERE | 071 502 691 | hubert.demeyere@gmail.com |
| **Interreto :** | Patrice VAN DE VELDE | 0478 251 419 | patrice.vdvelde@gmx.com |
| **Disvastigado** : | Guy BASYN | 010 688 282 | guy.basyn@skynet.be |

## FLANDRIO : FLANDRA ESPERANTO LIGO (FEL) vzw

Frankrijklei 140 (2000 Antwerpen) 03 234 34 00

info@fel.esperanto.be www.esperanto.be

FEL eldonas la paperan revuon « HORIZONTAAL » kaj la retan « VERTIKALE ».

Vi povas mendi librojn en la RETBUTIKO DE FEL : http://www.esperanto.be/fel/but/ls_serchu.php

## BRUSELO : ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO (EBG) asbl/vzw

| | | | |
|---|---|---|---|
| Françoise PELLEGRIN | (Rhode-St-Gebèse) | 02 358 27 28 | franaz@esperantobruselo.org |
| Nikolao de BUYL | (Koekelbergh) | 0478 382 981 | nikolao@esperantobruselo.org |
| Laurent LOISSE | sekretario@esperantobruselo.org | | www.espernantobruselo.org |

La Grupo eldonas la revuon « AKTUALA » : https://sites.google.com/site/ebgaktuala/

## VERDAJ SKOLTOJ asbl.

**[www.verdajskoltoj.net]** **info@verdajskoltoj.net**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Jean-Pol SPARENBERG | Prezidanto | 0475/27 23 19 | jpsparenberg@gmail.com |
| Valère DOUMONT | Sekretario | 0485/51 75 52 | doumontvalere@yahoo.fr |

## GROUPE DES CHEMINOTS : FERVOJISTOJ (BEFA)

Lucien DE SUTTER (BXL-Central) 058 501 825

Cours : 1er et 3ème mercredi, chaque mois de 13h30 à 16h

## *INTERNACIAJ ORGANIZAĴOJ - ORGANISATIONS INTERNATIONALES*

| | | | |
|---|---|---|---|
| **UEA :** Nieuwe Binnenweg 176 | NL-ROTTERDAM | +31 10 436 1044 | www.uea.org |
| **SAT :** Av. Gambetta, 67 | FR-75020 PARIS | +33 9 50 71 01 97 | www.satesperanto.org |
| **SAT-AMIKARO :** Bd Vincent Auriol, 132 | FR-75013 PARIS | +33 9 53 50 99 58 | www.esperanto-sat.info/ |

Ĉiuj informoj en franclingva Belgio ĉe Claude GLADY :

rue du CULOT, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916 cglady@arcadis.be

# INFORMOJ PRI ESPERANTO EN VALONIO

## CHARLEROI : KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA (K.G.E)

Rudy COGNIAŬ (Châtelet) 0492 710 974 rudycogniaŭ@swing.be
Mireille MARNETTE (Marcinelle) 071 324 733 marnette.mireille@skynet.be

## LIEGE-ESPERANTO asbl

Denise MAILLET (Embourg) 04 365 15 23 denise.dupont@skynet.be

## LOUVAIN-LA-NEUVE : « KVINFOLIO » asbl

André DEMARQUE (Wavre) 0486 516 085 ademarque@skynet.be

## VIRTON : GAUME ESPERANTO

Gaby SIMEON (Saint-Mard) 063 571 204

## SENLIME + VERVIERS (V.E.G)

Jean-Marie JACQUES (Verviers) 087 330 292 jacques@senlime.org
Jose JACOB (Polleur) 087 221 079

## KELMIS (LA CALAMINE) : « AMIKEJO »

Mathieu SCHRYMECKER (La Calamine) 087 853 389

## AUTRES VILLES WALLONNES

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **ATH** | Monique VAN ROY | (Ellezelles) | 068 542728 | |
| **BINCHE** | Maxime LECHIEN | (Vellereille) | 064 337 826 | |
| **CERFONTAINE** | Claude GLADY | (Cerfontaine) | 071/644 916 | cglady@arcadis.be |
| **COMINES** | J-C THUMERELLE | (Warneton) | 056 557 606 | jcthum@gmail.com |
| **DINANT** | Maurice WOUTERS | (Onhaye) | 082 644 635 | eo.wm.5520@skynet.be |
| **GEMBLOŬ** | José VINCK | (Gembloŭ) | 081 613 016 | |
| **MONS** | Edith COLAS | (Saint-Symphorien) | 065 313263 | |
| **NAMUR** | René PAIROŬ | (Malonne) | 081 460 594 | rene.pairoŭ@scarlet.be |

## KOMUNIKADO asbl

Denis FLOCHON (Namur) 081 743 853 info@komunikado.be

## SITE INTERNET D'APE

**Respondeculoj** : <patrice.vdvelde@gmx.com> kaj <hubert.demeyere@gmail.com>

http://esperanto-wallonie.be/

## BIBLIOTHEQUE D'APE - BIBLIOTEKO

**Respondeculo : Claude GLADY [Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916]**

## ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO (A.P.E.)

**COTISATIONS POUR APE EN 2016**

- **MEM : Pour être membre de APE : 10 €**
- **BUL : Pour recevoir les bulletins d'informations : 7 €**
- **FAM : Membre supplémentaire de la famille : 3 €**

**VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE72 000 3258537 16 BIC: BPOTBEB1**
**de l'Association pour l'Espéranto (APE).**

**NB: Indiquer les raisons du versement. Exemple : MEM+BUL+2xFAM : 23 €**

## ABONNEMENT A LA REVUE « ESPERANTO-INFO » : 20 €

**Vous pouvez payer directement au compte d'« ESPERANTO-INFO » (conseillé !)**
**Virement européen au compte IBAN: FR91 2004 1010 0811 9014 6B02 947**
**Indiquer : « NOM PRENOM pour Esperanto-Info adresse »**
**Vous pouvez aussi passer par le compte d'APE avec la mention « EoInfo »**

| Kodo | Universala Esperanto Asocio: UEA 2016 | | Ricevas |
|---|---|---|---|
| SA | Abono al la revuo "ESPERANTO" de UEA. | 41 € | Revuon "ESPERANTO" sen membreco ! |
| Kto | Abono al "KONTAKTO". | 25 € | Revuon "KONTAKTO" |
| MJ | Membro UEA + "Jarlibro" | 26 € | "JARLIBRON" |
| MJ-T | Membro kun Jarlibro ĝis 29 jaro inkl. | 26 € | Revuon "KONTAKTO" kaj "JARLIBRO" |
| MA | Membro Abonanto (MJ + SA) | 64 € | Revuon "ESPERANTO" kaj "JARLIBRO" |
| MA-T | Membro Abonanto ĝis 29 jaro inkl. | 64 € | Kiel MA plus "KONTAKTO" |
| MG | Membro UEA+"Gvidlibro" | 11 € | "GVIDLIBRO" |
| PT | Patrono de TEJO | 78 € | la revuon "KONTAKTO" subteno al TEJO sen membreco |
| SZ | Societo Zamenhof | 128 € | Mecenata subteno sen membreco. |
| DM | Dumviva membro de UEA (25xMA) | 1.600 € | Dumviva MA |

**Bonvolu pagi al la konto de la peranto**
**por UEA-kotizoj en franclingva Belgio :**

**BE50 750-6373051-18**

je la nomo de :
GLADY Claude Rue du Culot, 1
B-5630 CERFONTAINE

UZU LA KUNMETITAN ĜIRILON

BN: La "JARLIBRO" de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj de UEA…

La "GVIDLIBRO" estas la "Jarlibro" sed sen la adresoj !

"KONTAKTO" estas la revuo de la junulara sekcio de UEA : TEJO

BN : Bonvolu nepre motivi vian ĝirilon per kodoj :
Ekzemple : MJ aŭ MA+Kto